Sed »Apud la profunda kelo« staris fraŭlino Poldýnka kaj ŝi ĵus rakontis al sinjorino konsilantedzino Kdojeková: »Li havas tie tiom da fumo, ke ĉio estas fumajita«. Kaj kiam tagmeze venis grisupo sur la tablon, fraŭlino Poldýnka certege asertis, ke ŝi »sentas el ĝi tabakan fumon«, kaj ŝi formetis la kuleron.

Antaŭ la vespero rakontis al si jam ĉiuj najbaroj, ke en la vendejo de sinjoro Vorel ĉio malbonodoras pro tabaka fumo, ke la faruno estas kvazaŭ rostita kaj la grio kvazaŭ fumajita. Kaj oni jam nomis sinjoron Vorel neniel alie ol »fumajita grivendisto« — lia sorto estis decidita.

Sinjoro Vorel suspektis nenion. La unua tago estis malriĉa, bone. La dua, la tria tago — nu, tamen la afero ankoraŭ sukcesos! En la fino de la semajno li ne enspezis eĉ du guldenojn — tio tamen estas iom —!

Kaj estis ĉiam egale. El la najbaroj venis neniu kaj ankaŭ malofte envagis en la butikon iu vilaĝano. Regule venadis sole sinjoro Vojtíšek. La sola konsolanto de sinjoro Vorel estis lia marŝaŭma pipo. Ju pli ĉagrenigita li estis, des pli grandaj rondoj de fumo ruliĝadis el lia buŝo. La vangoj de sinjoro Vorel paliĝadis, la frunto sulkiĝadis, sed la pipo estis ĉiutage pli ruĝa kaj heliĝis pro bonstato. La policistoj el la strato Ostruhová venenplene rigardis internen en la butikon la senlaca fumanton — se li, kun la pipo en la buŝo, almenaŭ sole unufoje estus elirinta trans la sojlo sur la straton! Precipe unu el ili, malgranda sinjoro Novák, estus doninta kion ajn, se li povus elpuŝi al li la brulantan

pipon el la buŝo. Ili instikte simpatiis kun la antipatio de la najbaroj al la fremdulo.

La vendejo estis ruiniganta kaj malriĉiganta. Post kvin monatoj proksimume komencis vizitadi sinjoron Vorel suspektindaj personoj, Hebreoj. Tiame ĉiam sinjoro Vorel duone fermis vitran pordon de la butikoj. La najbaroj rakontis al si tute konvinke, ke Malá Strana (Malgranda urbo) vidus bankroton. »Kiu komencas ion kun Hebreoj!«

Antaŭ la tago de sankta Galeno oni jam rakontis, ke sinjoro Vorel estos elloĝigita, kaj ke sinjoro domposedanto denove farigos el la butikoj loĝejon. Fine, unu tagon antaŭ la transloĝigo, la butikoj restis jam definitive fermita.

Sed la sekvantan tagon estis antaŭ la fermita vendejo de sinjoro Vorel senĉese de la naŭa horo matene ĝis la vespero multego da homoj. Oni rakontis, ke la dommastro, kiam li povis nenie trovi sinjoron Vorel, malfermigis perforte la butikon, ke sur la straton elfalis malsupre ligna benketo kaj supre la malfeliĉa grivendisto, pendigita tute supre sur hoketo.

Je la deka horo venis juĝista komisiono kaj eniris la butikon tra l' interno de la domo. Oni demetis la sinmortiginton kaj sinjoro Uhmühl, polica komisario de Malá Strana, kunhelpis.

Li enŝovis la manon en kalmukon de la mortinto kaj elprenis el ĝi la pipon. Li ĝin tenis kontraŭ la lumo kaj diris: »Tiel bone fumumitan marŝaŭman pipon mi neniam vidis — rigardu!«

El »*Malostranské povídky*« (Malgrandurbaj rakontoj, 1878). Traduko el 1905.



RAPORTOJ KAJ NOTIZOJ.

La unua kunveno de moraviaj esperantistoj okazis — laŭ la iniciato de »Bohema asocio esperantista« — en la tagoj 13. 14. kaj 15 de aŭgusto 1910 en belega slava banloko Luhačovice (Moravio), tre taŭga por fariĝi esperantista somera kolonio. Sabate (13. VIII.) vespere estis brila artista akademio, en kies bohema-esperanta programo estis ankaŭ originala esperanta kanto (»barcarola«) »Al vi, bela amatino!« kun muziko speciale verkita de fama bohema komponisto Nešvera. Dimanĉe (14. VIII.) antaŭtagmeze estis publika kunveno (prezidis unu el la plej malnovaj bohemiaj esperantistoj s-o J. Socha el Hluk), en kiu s-o Krumpholtz, instruisto el Bystřice pod Hostýnem parolis (boheme) pri »Signifo de esperanto por pligrandigo de fremdulaj vizitoj ĝenerale kaj en Luhačovice speciale«; en tiu ĉi kunveno estis akceptita rezolucio, en kiu oni petas de aŭstriaj ministerioj de la publikaj laboroj kaj de la komerco, ke ili atentigu ĉiujn interesatajn instituciojn pri la signifo de esperanto por subtenado de fremdula movado, por komerco kaj industrio, kaj en kiu oni petas de la ministerio de fervojoj, ke kiel al la germanacia personaro rilatiganta kun

uloj estis donita germana libreto pri esperanto (de J. Borel), tiel estu donita al la bohemia personaro bohema lernolibreto pri esperanto (de Čejka). Vespere estis publika esperanta debatvespereto kun temo »Pri manieroj de la propagando« (prezidis prof. Fridrich el Prostějov); la interesa diskuto estis komencita de prof. dr. Kamaryt per esperanta parolo »Ĉu idea movado povas esti neŭtrala?«; multaj parolantoj partoprenis. Poste oni diskutis pri internaj aferoj de bohemiaj esperantistoj; ĉar er la kunveno partoprenis la partianoj de l' ambaŭ centraj unuigoj de bohemiaj esperantistoj kaj ĉiu povis libere, sincere esprimi sian opinion, la diskuto estis tre vivoplena kaj bone montris la dezirojn de la kunvenintaro. Ĝenerale oni bedaŭris la disiĝon inter la bohemia esperantistaro kaj ĉiujn farojn fortigantajn la malpacon; precipe grandan malplaĉon elvokis la kontraŭstaro de Unio kontraŭ kunlaboro kun Asocio en la dua Aŭstria esperanto-tago en Praha, tre maldelikate esprimita de la reprezentanto de Unio en Wien'a esperanto-tago; la kunvenintoj, Asocioj kaj Unionanoj, ĉiuvoĉe akceptis la rezolucion al la preparo komitato por aŭstria esperanto-tago, ke »Bohemia unio esperantista« kaj »Esperanto-Verein Verda Stelo« invitu »Boheman asocion esperantistan« kunlabori en la dua aŭstria esperanto-tago. Lunde (15. VIII.) estis publikaj ekzamenoj pri esperanto, kiujn kunestis multaj personoj. La kunveno de moraviaj esperantistoj sekvata kun intereso de diverslandaj banejgastoj faris grandan propagandon kaj pro sia sincereco, senpartieco kaj libereco multe helpis por sanigo de la esperantista afero en Bohemiaj landoj. Tial estas nemirinde, ke oni deziris, ke ĉiujare okazu tiaj kunvenoj, en kiuj neniu estas eligata, en kiuj oni povas libere kaj sincere paroli, ĉar ĉiu opinio estas respektata. Bšk.

Mondkongreso de la internaciaj asocioj kunvenis la 9.—11. de majo en Bruxelles. La celo de tiu ĉi siaspece unua kongreso estis laŭ invitletero sendita al diversaj internaciaj asocioj »la studo de l'internacia organizado en ĉiuj fakoj kaj en ĉiuj formoj: scienco kaj arto; juro kaj politiko; socio kaj ekonomio«. La programo de la kongreso koncernis jenajn temojn: 1. kunagado de internaciaj asocioj; 2. jura reĝimo de l'internaciaj asocioj, (leĝa rekono, civila personeco k. c.); 3. internaciaj sistemoj de unuoj en la sciencoj kaj en la teknikaj servadoj; 4. tipoj de internaciaj organismoj; 5. internaciaj asocioj kaj organizado de la bibliografio kaj dokumentado; 6. scienca terminaro kaj internaciaj lingvoj. — Partopreni en la kongreso povis kiel ĉiuj internaciaj asocioj (societoj, unioj, federacioj, kongresoj, konferencoj, institutoj, oficejoj, gazetoj k. c.) tiel individuoj, kiuj danke siajn studojn, oficojn kaj okupojn havas intereson pri programo de la kongreso kaj povas kunlabori je ĝia tasko. Registaroj kaj grandaj publikaj administracioj estis invititaj ad audiendum por esti informitaj pri nuna stato de praktika internaciismo. En la kongreso estis reprezentitaj 131 asocioj per pli ol 200 delegitoj. Tre ĝojinda fakto estas, ke inter reprezentataj asocioj estis 13 esperantistaj kaj ke inter kongresanoj estis multaj esperantistoj. Tio pruvas tre bone, ke kelkaj esperantistoj jam komencas kompreni, ke la plej efika propaganda maniero estas partopreno en internaciisma laboro, organizado de internaciaj servoj, respektado de bezonoj de internacia vivo. La kongreso havis bonan sukceson. Oni povas kun negranda hiperbolo diri, ke la kongreso kreis bazon por scienco de internaciismo. La kongreson prezidis sro Bernaert, eksministro de ŝtato, Princo Rolande Bonaparte, generalo Sebert, membroj de la franca Instituto, Profesoro Wilhelm Ostwald el Leipzig, E. Solvay industriisto el Bruxelles, Lejeune, Carton du Wiart. La laboroj de la kongreso estis divitaj en tri sekcioj. La unua okupis sin pri la jura reĝimo de la internaciaj asocioj, la dua studis la sistemojn de unuoj uzataj en la scienco kaj tekniko, la tria okupis sin pri la demandoj de bibliografio, dokumentado, kaj terminaroj. Pri la problemoj de la helpa

lingvo internacia estis aranĝita la 11-an majon speciala kunveno de la dua kaj tria sekcioj. En ĝi estis vigla diskuto pri alpreno de lingvo internacia, en kiu partoprenis precipe Wilmotte, Bourlet, Ostwald, Lecoine k. a. m. Kelkaj el la parolintoj ankoraŭ proponis enkonduki francan aŭ alian lingvon naturan kiel helpan lingvon. Sed la plimultaj enestantoj konsentis, ke estas bezone enkonduki lingvon neutralan, artefaritan. Decido pri elekto de tia lingvo ne estis farita. Tio estas tre saĝa kaj plej bone pruvas la seriozecon de la partoprenantoj, ĉar voĉdono de tiaspeca kunveno ne povas trudi alprenon de ia artefarita lingvo. La problemo de helpa lingvo ne solviĝos en decidoj, sed en praktiko de scienco kaj ordinara vivo. Idistaj kondukantoj havas pri tio kontraŭan opinion, sed ili eraras. La rezultato de la kongresaj laboroj estas jenaj de la kongreso aprobitaj deziroj: 1. per diplomata interkonsento estu starigata internacia regularo por asocioj, kiuj ne celas gajnon, kaj kiuj pro sia naturo, ne povas aŭ ne volas esti submetataj sub la societa leĝaro de ia definitiva regno; 2. estu fondata Centra oficejo de Jura dokumentado; la kongreso transdonas al sia estraro la taskon organizi tiun ĉi institucion kaj komunikas la projekton al interesigantaj juristaj asociaj por antingi interkonsenton kun ili pri ĝia realigo; 3. tiuj internaciaj asocioj, en kies agadfako la unuecigo de la mezuroj ankoraŭ ne estas efektivigita, prizorgu, ke tiu ĉi unuecigo estu farita laŭ metra sistemo; la kongreso decidu, ke estu fondata komisiono, por ke tiu ĉi deziro estu komunikata al ĉiuj internaciaj koncernataj asocioj; laŭpoveble oni devas sciigi ilin pri la unuecigoj jam efektivigitaj informante ilin pri vojoj kaj rimedoj taŭgaj por certigi la estontajn unuecigojn; 4. en la sciencaj terminaroj ĉiu ideo estu ĉiam reprezentata per la sama esprimo, kaj ĉiu esprimo signu ĉiam la saman ideon; 5. al la internacia instituto de bibliografio estu sendataj listoj pri la dokumentaj kolektoj de ĉiuj internaciaj asocioj; 6. internacia Unuiĝo de dokumentado estu fondata; 7. internacia kodo pri katalogografiaj reguloj estu starigata. — Por certigi la praktikigon de siaj rezolucioj, la kongreso starigas sian estraron kiel konstantan komision, donante al ĝi la taskon verki preparan projekton de konvencio kaj de aplika regularo komunikota al la aniĝintaj internaciaj asocioj por kolekti iliajn rimarkojn kaj observojn. La kongreso admonas sian estraron, ke ĝi petu la Belgan registaron meti tiun ĉi laboron al aprobo de la aliaj ŝtatoj.

Kamaryt.

La IV. kongreso de „Internacia asocio de akademioj“. »Association internationale des Académies« havis sian kvaran kongreson la 8—15 de majo t. j. en Roma. La celo de tiu ĉi grava unuiĝo estas efektivigo, pligrandigo kaj plifaciligado de kunlaboro inter diversnaciaj sciencistoj kaj sciencistaj societoj. La asocio estis fondita en la jaro 1900 kaj havas ĝis nun 22 membrojn, plej gravajn sciencajn akademiojn. Estas inter ili akademioj kaj sciencaj societoj de jenaj urboj: Amsterdam, Berlin, Bruxelles, Budapest, Göttingen, Kopenhagen, Kristiania, Leipzig, London (Royal Society), München, Paris (Académie des sciences, Académie des sciences morales et politiques, Ac. des Inscriptions), Petersburg, Roma (Accademia dei Lincei), Stockholm, Tokio, Washington, Wien. Ĉiutrigare havas la asocio kongreson; la unua estis en Paris (1901), kaj oni decidis, ke la unua granda entrepreno de la asocio estos kritika eldono de ĉiuj verkoj de Leibniz kaj de Euler. La dua kongreso estis en London (1904), la tria en Wien (1907); tiu ĉi kongreso respondis al la peto de »Delegacio por alpreno de helpa lingvo internacia«, ke la asocio ne estas kompetenta elekti kaj enkonduki helpan lingvon internacian. La kvara kongreso estis tiujare (1910) en Roma. Ĝi akceptis la raporton pri preparaj laboroj pri eldono de verkoj de Leibniz, kiuj jam estas finitaj tiel, ke baldaŭ la akademioj de Berlin kaj Paris komencos eldonadi ilin laŭ kronologia sekvo. Por eldono de verkoj de Euler

oni disponas je 400.000 frankoj. Krom tio raportis diversaj membroj pri kelkaj gravaj literaturaj kaj eksperimentaj entreprenoj, precipe pri eldonado de antikaj dokumentoj »Corpus documentorum Graecorum« kaj »Corpus medicorum antiquorum«, pri institutoj por studo de cerbo (ĝis nun ekzistas 7), pri studoj de Eötvös pri gravitaciaj diferencoj konstatebaj en interspaco da 40—50 km, kaj pri kompletigo de luna nomenklaturaro. Kiel prezidanto por venontaj tri jaroj estis elektita akademio de Petersburg, kiu devas ankaŭ aranĝi la venontan kongreson (1913). Kiel ĝis nun ni ankaŭ venonte sekvas la agadon de tiu ĉi grava internacia asocio*) kaj ni ĉiam raportos pri ĝi.

Kamaryt

Unuanimeco estas devizo certe tre utila. Sed ekskluzive unuanimeco en kaj por bono kaj vero. Ĉar povas ankaŭ ekzisti unuanimeco en malbono, eraro, malvero aŭ mensogo. Tiel unuanimeco malutilas al la societo, kiu unuanimiĝas. Do antaŭ esti unuanima, oni bezonas serĉi la veran bonon. Tiu serĉado tute ne similas unuanimecon; tre ofte ĝi similas batalon eĉ pasian. Ĉar ekzistas tre diversaj metodoj por serĉi la veron. Inter ili estas certe tre efika malkovrado kaj montrado de malbono, malvero, mensogo. Mirinde, ke kelkaj esperantistoj ne komprenas la gravecon de tiu ĉi metodo plibonigadi socian bonfarton! Ĝi havas antaŭ la aliaj metodoj la preferon, ke ĝi montras almenaŭ kuraĝon kaj amon al la vero. Dangera estas timo montri siajn vundojn. Ĉiuj bataloj, kiuj celas bonon kaj veron, rezultas finfine en la vera unuanimeco. Kontraŭe unuanimeco en mensogo, malbono kaj malvero rezultas finfine en destrukto, malversacio, bankroto, memmortigo.

Kamaryt.

Esperantaj fajreroj (Originalo esperanta). — Ĉiu publike esprimita penso estas kunpropraĵo de ĉiuj, kiuj ĝin aprobas. — Ankaŭ la plej antipatia ekstera malbeleco de kiu kaj kia ajn ekzistaĵo estas en sia substanco belega. — Se oni ion ne komprenas: la malsaĝuloj demandas, la saĝuloj silentas. — Malfermitaj kapoj bezonas multe da purigado. — Se oni volas kapti la liberan beston, ĝi sin defendas ĝis la furiozeco, homo kontraŭe antaŭ la libereco.

Jan Otcovský.

Inicilo matematika. Tre bona pedagogia principo estas ne disigi la instruadon de l' edukado. Por esti vere bona, ĉiu instruado devas esti eduka. Por esti eduka, ĝi devas esti objekta. Precipe la komenca, prepara instruado povas sukcesi sole, se ĝi estas objekta — plenigadi la kapojn de l' infanoj per abstraktaĵoj estas ne sole senutile, sed eĉ malutile. Objekta devas esti ankaŭ la instruado pri la fundamenta scienco, pri matematiko, kies eduka valoro estas granda. Sed por objekta instruado oni bezonas bonajn helpilojn. Unu el la bonegaj instruiloj pri matematiko estas »Inicilo matematika« de Jacques Camescasse, kiu donas aplikon al la ideoj de »Iniciado matematika« de C. A. Laisant kaj faciligas la praktikadon de tiu ĉi metodo kiel en familioj tiel en lernejoj. »Inicilo matematika« estas ludilo kaj instruilo samtempe; ĝi havas bonegan econ, ke la infanoj lernas amuzante sin kaj amuzas sin lernante. Ĝi konsistas el 1.200 lignaj kubetoj (600 blankaj, 600 ruĝaj) kaj el 144 metalaj vergetoj; la kubetoj (teorie 1 cm³) estas kunigeblaj per vergetoj (longaj 92 mm) tiel, ke oni povas fari senombrajn kombinojn. Sekve ĝi antaŭ ĉio ebligas al la infanoj konstrui diversajn bildojn, kahelarojn, mozaikojn, senombrajn objektojn ktp. Ĝi estas ludo, kiu plezurigas la infanojn, kiuj amas labori per siaj fingroj; tiu ĉi ludo devigas la infanon pensi, juĝi, konstrui mem, serĉi novajn kombinojn,

*) Vidu la artikolon »Asocio internacia de akademioj« de Fa en »Bohema esperantisto« (jk. 1., kj. 12, pĝ. 137.).

La red.

novajn konstruadojn, ĝi vekigas kaj subtenas la iniciaton, juĝemecon, observemon, inventemon (eltrovemon) kaj metodemon; tio estas grandega profito por la infana spirito! Kiel instruilo pri l' elementara matematiko ĝi lude enkondukas en la konon de la misteroj de matematiko, ĝi konigas la ĉefajn principojn de aritmetiko, algebro kaj geometrio. Ĝi konigas samtempe la principojn de la dekuma nombrado kaj la elementajn geometriajn formojn (sekve: la metran sistemon): ĝi objektigas, konkretigas la simplajn aritmetikajn operaciojn, adicon, subtrahon, multiplikon, dividon, frakcion, kvadratajn kaj kubajn radikojn, aritmetikajn, algebrajn kaj geometriajn teoremojn kaj formulojn. Kaj ĉio estas facile farebla (la objekto estas simpla: du specoj da objektoj por fari multenombrajn kombinojn) kaj tuje, oni povus diri aŭtomate, kontrolebla (ĉiu eraro estas montrata aŭ per manko aŭ per troo). Tiuj ĉi karakterizaj ecoj — facileco en la laboro kaj certeco pri korekteco — estas gravaj, ĉar ili flamigas la apetiton de l' infanoj por laboro (la malfacileco kaj nekontrolebleco ĉiam deprenas al la lernantoj la apetiton por labori — tial la infanojn tedas la lernado el la libroj kaj prezentado de l' operacioj sur papero). Mallonge: »Inicilo matematika« estas bela ludilo kaj bona instruilo por familoj kaj lernejoj (la kombinojn povas fari kelkaj personoj samtempe, ekz. la tuta familio). Certe multaj infanoj, kiuj malamas la matematikon (kulpo de la metodo!), plaĉigus ĝin al si, se ili estus instruataj pri ĝiaj elementoj objekte. Kaj por objekta instruado pri elementara matematiko al la infanoj bonega rimedo estas — »Inicilo matematika.«*)

Bšk.



ZPRÁVY SPOLKOVÉ.


Svaz českých esperantistů pořádá druhou řádnou valnou schůzi dne 28. září 1910 o 9 hod. dop. v Praze v restaurantu Kolářově (II. Celetná). Jelikož zvláštní pozvánky se nerozesílají (poněvadž každý člen dostává oficiální orgán), správní výbor svazu upozorňuje pp. členy na pozvání otištěné na obálce revue »Čes. esp.« a prosí, aby pp. členové účastnili se valné schůze v počtu největším. Spolky sdružené žádá snažně, aby — pokud tak neučinily — jmenovaly své delegáty (resp. jich zástupce) pro valnou schůzi. Zároveň vybízí všechny pp. členy, aby zaslali v čas hojnost návrhů, o kterých by valná schůze měla pojednati.

Zkušební komise „Svazu čes. esp.“ pro král. České zasedati bude dne 28. září 1910 odp. (místoprost a hodina oznámí se interesentům přímo). Přihlášky a dotazy zasílejte na sekretáře Jazykového výboru (H. K. Bouška, t. č. Čejtice),

Klub esperantistů, hádankářů a šachistů ve Vítkovicích pořádá u příležitosti výstavy domácích potřeb, kterou pořádá odbor Národní jednoty v Českém domě ve Vítkovicích ve dnech 18.—25. září výstavu esp. časopisů, pohlednic, dopisů a literatury a žádá p. t. spolky esper. a jednotlivce o zaslání tiskovin vhodných pro výstavu; za které spolek ručí a po ukončení výstavy ihned zpět zašle. Zásilky adresujte: Jan Gabzdyl, t. č. předseda, Vítkovice 413, Morava.

*) »Inicilo matematika« de J. Camascasse estas vendata de librejo Hachette et Cie, Paris, Bvd. St. Germanin 79 po Sm 4'75 (K 11'20). Al ĝi estas aldonita aŭ franca aŭ esperanta broŝuro klariganta la uzmanieron.

Zodpovědný redaktor H. K. Bouška. — Nakladatel Jan Iglauer. — Tisk »Politiky« v Praze.

 **Podporujte a doporučujte firmy u nás inserující!**

POZVÁNÍ

ke

druhé řádné valné schůzi Svazu českých esperantistů (Bohema asocio esperantista)

která konati se bude dne 28. září 1910 o 9. hod. dop.
v restaurantu Kolářově v Praze (Celetná ulice) s tímto
programem:

1. Čtení zápisu o poslední valné schůzi.
2. Zprávy funkcionářů.
3. Doplnovací volby správního a dozorčího výboru.
4. Volné návrhy.

Nesejde-li se v ustanovenou hodinu počet členů potřebný
k usnášení, bude se konati valná schůze v týž den o hodinu
později v téže místnosti a s týmž programem, která se bude
platně usnáseti za každého počtu členů.

POZNÁMKA: Volné návrhy musí býti oznámeny aspoň
tři dny před schůzí gen. sekretáři (p. Mil. Schmidt, Praha
11., 1036, Hybernská Dep. XIV.)

ČESKÉ
VÍNO!

Beřkovická vína

Hlavní sklad v Praze:
Hybernská ulice č. 12.

doporučují se jako ryze česká, velmi
zdravá, posilující a lahodná, četnými
lékaři doporučená. Veškeré dotazy vyřídí
Správa vinařství prince Ferd. z Lob-
kovic v Doln. Beřkovicích u Mělníka.



FR. SKRČENÝ

V PRAZE, VODIČKOVA ULICE 32.

Filiálka: Příkopy, č. 27 n. „Velký Bazar“

doporučuje ve velkém výběru za velmi levné ceny:
Lampy, lustry, ampule, sklo, sklenice
na pivo, víno, vodu a likéry. **Porculánové**
přibory jídelní, na kávu a čaj. **Domácí a**
kuchyňské nádobí. :: Úplné vybavy
pro nevěsty. :: Cenníky zdarma.

Podporujte a doporučujte firmy u nás inserující!

Učebné pomůcky pro samouky i kursy.

Vydání malá.

- Sv. 1. **Učebnice esperanta.** Upravili Th. Čejka a Jos. Krumpholc. — 6. vyd. zcela přepracované. — Cena 20 h, poštou 23 h.
Sv. 2. **Slovníček esper.-český.** Sestavil Th. Čejka. — Cena 20 h, poštou 23 h.
Sv. 3. **Slovníček česko-esper.** Sestavil Th. Čejka. — Cena 30 h, poštou 33 h.
Sv. 4. **Methodická učebnice esperanta** (mluvnice, cvičebnice a oba slovníčky). Sestavili Th. Čejka a Jos. Krumpholc. — Cena eleg. váz. výt. v kapesním formátu K 1'10, poštou K 1'20.

Slovník česko-esperantský (obsahuje více než 10.000 slov). Sestavil Th. Čejka. Cena 90 h, poštou 95 h.

Vydání velká.

- Sv. I. **Úplná učebnice esperanta.** Napsali Th. Čejka a Jos. Krumpholc. — IV. vyd. (doplněné). — Cena K 1'50, v eleg. angl. měkké vazbě 2 K, poštou o 10 h více. Obsahuje Zamenhofovo „**Fundamento de esperanto**“.
Sv. II. **Slovník esper.-český** (podrobný). Sestavil Th. Čejka. — Cena 2 K, v eleg. angl. měkké vazbě 2'50, poštou o 10 h více.
Sv. III. **Slovník česko-esperantský** (podrobný). Sestavuje Th. Čejka.
Sv. IV. **El la historio de esperanto.** Obsahuje Dr. L. Zamenhofův „List o původu esperanta“ a zajímavou řeč Dra K. Beina a Dra L. Zamenhofa, proslovenou na I. kongresu esperantistů 1905. — Cena 30 h. Spisek tento hodí se znamenitě k dalšímu cvičení v esperantu, zvláště pro výborný sloh esperantský.

Vedle těchto spisů doporučujeme ještě časopis **Český esperantista** roč. I. a II. ve sníž. ceně 2 K a **Revuo Internacia** (160 str. poučné i zábavné četby) za 2 K. — Kdo objedná všechny tyto 3 časopisy najednou, obdrží je, pokud zásoba stačí, vyplaceně za K 5'50. — **Všechny objednávky vyřizuje** — však jen po předchozím zaplacení obnosu — **TH. ČEJKA, Bystřice-Hostyn, Morava.**

Propaganda. Nejvhodnější pomůckou propagační je „**Esperanto na jednom listě**“. Úplná mluvnice a slovník esperantsko-český (obsahuje všechna základní slova, na 2000 kmenů, tedy skutečný klíč k Esperantu)! — 1 výt. za 2 h, 10 výt. franko za 20 h, 50 výt. za 55 h, 100 výt. za 1 K, 500 výt. za 3 K, 1000 výt. za 5 K. — Za obnos předem obdržený (i v poštov. známkách) zasílá **Th. Čejka, Bystřice-Hostyn, Morava.**



Esperantské nálepky

100 kusů poštou vyplaceně za K — 70
500 „ „ „ „ „ 2'70
Bez poštovní zásilky o 10 hal. méně.

Esperantaj glumarkoj

100 ekzempleroj Sm. — 35
500 „ „ „ 1'40

liverataj de **J. Iglauer, Praha III.-495, Bohemujo.**

Četl jste již brožuru o utrpení Slováků „Slovakoj kaj Magiaroj“?

Ne-li, objednejte si ji co nejdříve, neboť, ač byla vydána ve velmi značném počtu výtisků, bude co nejdříve úplně rozebrána. Brožura tato vyvolala veliký zájem a mocné protestní hnutí za hranicemi a byla již přeložena do celé řady evropských jazyků, nehledě k uveřejněným výňatkům, zprávám a posudkům v nejvýznamnějších časopisech celého světa. Objednávky přijímá (poštou 55 hal. i s poštovným) **V. Riegel, Praha 729-VII. Klubům a kroužkům esperantským na nejméně tři objednané a předem zaplacené výtisky jeden zdarma.**

Redaktoro: H. K. Bouška, Praha-Smíchov 1097. — Eldonanto: Jan Iglauer, Praha III, 495. — Presejo: »Politika«, Praha. — Bohemujo-Aŭstrio.